

Kvara kaj lasta komuniko de la 46a Konferenco de ILEI Herzberg, Germanio

2013-07-18

Du honoraj membroj nomumitaj

La 46a Konferenco de ILEI finiĝis la 18an de julio 2013.

El inter la 19 prelegoj de la semajno menciindas tiuj de s-ro Huang Yinbao "Trezoro", 'Angla lingvo perfortas ĉinajn lernantojn', s-ro Duncan Charters 'Virtuala lingvolernejo – laboratorio en la nuboj' kaj dr-ino Ilona Koutny, 'Universitata programo de formado de instruistoj'. La plena programo aperos ĉe www.ilei.info.

La Komitato aprobis la elekton de du Honoraj Membroj, nome

Doktorino Katalin Kovats, redaktorino de la porinstruista paĝaro www.edukado.net, aŭtorino de diversaj faklibroj kaj lertigisto de geinstruistoj. Sinjoro Stefan MacGill, kiu prezidis la ligan dum preskaŭ kvar jaroj, faris por ILEI elstarajn laborojn, verkis lernolibrojn, redaktas la revuon "Juna Amiko" kaj ankoraŭ multe pli.

La prezidanto Mireille Grosjean emfazis, ke tia honorigo ne nepre venas kun granda aĝo, sed utilas ankaŭ por kuraĝigi efikajn personojn en ia momento de ilia vivo, por montri respekton al ili, admiron kaj dankon, kaj por kuraĝigi aliajn agi simile.

Dum la Konferenco alvenis informo de S-ino Gong "Arko", ke ŝi akceptas fariĝi dua vicprezidantino de ILEI.

La Komitato aprobis Rezolucion, kiu emfazas edukadon kaj rilatas al la Kongresa Temo de UK: insuloj. Ĝi videblas sube, en la UK kaj en la retejo www.ilei.info

La Komitato asignis al Stefan MacGill respondecon por du komisioj: Verkado de la kurso e125 kaj redaktado de la revuo "Juna Amiko".

=====

Pretigis: Mireille Grosjean

Pli da informoj ĉe: <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de>

Por plia diskonigo.

Pliaj fotoj sekvas ankaŭ ligoj al retejaj albumoj.

Rezolucio de la 46a ILEI-Konferenco

12an – 19an de julio 2013 en Herzberg-Sieber, Germanio

2013-07-17

Okaze de la 65-jariĝo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj la partoprenantoj de la 46a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) esprimas sian gratulon al tiuj membro-ŝtatoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj lojale al la Homaj Rajtoj, al la Infanaj Rajtoj kaj

specife al la Rajto pri EDUKADO, kaj invitas ĉiujn membro-ŝtatojn progresi en tiu lojaleco kun aparta atento al edukado de virinoj, knabinoj kaj knaboj.

La Ligo deziras, ke aparta atento estu donata al subpremataj, ekspluatataj kaj senrajtigitaj homgrupoj. La Ligo atentigas interalie pri indiĝenaj popoloj forigataj el sia kutima loĝloko ; tiuj etnoj estas pli kaj pli izolitaj kvazaŭ insuloj margene de la hom-mar.

=====